



## Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI: 12-a de Januaro 2016

Ĉeestantoj: Amri Wandel, Jehoŝua Tilleman, Matilda Landaŭ, Dror Gaon, Ŝlomo Ŝaĥar, Lea Kudevitzki, Miĥal Amir, Doron Modan, Eran Vodevoz, Gabi Zeevi.

**Raportoj:** (Amri)

- a) La Zamenhofa Vespero estis unu el la plej sukcesaj lastatempe.
- b) Novjaraj renkontiĝoj en Germanio: en Luminesk, ĉ. 50 partoprenantoj, en Saarbrücken pli ol 200. Amri prelegis pri Israelo kaj la Israela Kongreso en ambaŭ. Ne sukcesis varbi novajn abonantojn por IE, sed vendis kelkajn ekzemplerojn de la nova Infanlibro "Finsulo".

*La Estraro dankas al Joela kaj al Lea (i.a. pro gvido de la eta kaso).*

### **1. Asekuro por la klubejo / la klubanoj:** (Eran, Jehoŝua)

- a) Propono/informoj de Joela. **Amri:** La letero al la superuloj de Ariela (kun kopio al ŝi) – al la centro de la instruaj institutoj de Tel Avivo - estas preta, sed mi ankoraŭ ne sendis ĉar venis propono de Joela pri nova klubejo en VICO. **Lea:** tiu propono eble ne estas reala.

**Konsento:** Amri sendos la leteron.

- b) Kontrakto kaj pago al Bikurej Haitim por 2016 (eventuale por malpli ol unu jaro) – ni devas fintrakti dum la venonta kunveno.
- c) Trovo de alternativa loko: VICO apud hospitalo Iĥilov? Ili ankoraŭ ne respondis al Joela kiu estis en kontakto kun ili. Matilda: eble en Miŝan (Ramat Aviv) ? Ŝi demandos.

### **2. Dratverejo** (Jehoŝua)

- a) Kontrakto-renovigo la kun la vidvino - kiom ŝi kapablas pagi? 2000 siklojn. Por kiom da tempo, duonjaro? Kiom estas la reala lupago? Lau esploroj de Eran kaj Amri en la retejo "Yad2" ĉ. 2800 sikloj. Ĉu indas serĉi novan luanton?

- b) **Konsento:** ni renovigu la kontrakton kun ŝi por tuta jaro, kun lupago de 2000 sikloj, sed kun anticipa dumonata averto en la kontrakto pri eventuala liberigo de la loĝejo (**Jehoŝua**).

- c) **Amri:** Ĉu vendi la loĝejon, cele aĉeti novan ejon en Tel Avivo? Ĝia merkata valoro nun estas ĉ. 900 mil sikloj. Oni povas aĉeti oficejon en Tel Avivo (ekz. en Sarona, laŭ Eran, eblas por ĉ. 1 miliono). **Diskuto.** Malavantaĝoj: ni perdas la monatajn lupagojn, eble ni devos aldoni iom de nia kapitalo, kaj la tenokostoj de oficejo estas pli altaj ol de loĝejo. Avantaĝoj: ni havos nian propran kunvenejon, kaj ni povos luigi ĝin al kiel oficeja spaco. Kiu okupiĝu pri tio? – intertempe neniu volontiĝas.

**Eran** respondecos pri serĉado de novaj luantoj de la loĝejo.

2/...



### 3. Financoj (Ŝlomo)

- a) Financaj buĝetoj por 2015 kaj 2016/17: "Rasam Haamutot" diris ke oni ne aprobas tro altan profitan buĝeton. Necesas malaltigi la "profiton". Petas ideojn.
- b) **Amri**: en la buĝetoj de 2015 kaj 2017 mankas la E-budo en la Libro-Foiro (ĉ.4000 NIS), necesas ldoni la afrankon por IE en- kaj eksterlande (ĉ. 500 NIS); eblas pagi "subvenciojn" por la kurs-instruisto (ne eblas al estrarano!) kaj por redaktoro de IE; budo en la "Semajno de Libro" en Tel Avivo. **Dror**: ni pagas jare/dujare por la domajno kaj por la servilo. Stipendioj, reklamoj, ktp.

### 4. Nova Esatraro kaj proceduroj

- a) Disdonado de taskoj: la samaj taskoj kiel pasintjare, plus kelkaj etaj aldonoj (vidu **anekson** en la fino). **Eran**: juraj aferoj plus konsultanto pri valorpaperoj. **Doron**: pro personaj kaŭzoj sen difinita tasko ĉi-jare. **Lea**: la eta kaso bone funkcias, la bilanco estas gvidita en ordo.
- b) **Protokolo**: Ŝlomo ŝatus ricevi ĝin pli frue. Ĉu necesas laŭtelgi la protokolon de la antaŭa kunsido? – diskutota venontfoje!
- c) Reta diskutado kaj debato de longaj tempoj antaŭ la kunsido: **Gabi** plendas pro tro longa hebrelingva diskutado kaj citado de ĉiuj antaŭaj leteroj, kiuj plilongigas la tekstojn.

### 5. Israela Esperantisto (Amri)

- a) La vintra numero 2015 estis printita ĝustatempe. Amri disdonis al 38 membroj dum la ZV, kaj listigis la ricevintojn.
- b) Ĝisdatigo de la dissendo-listo kaj adresaro enlanda (membroj) kaj eksterlanda (abonantoj kaj institucioj) – Jehoŝua preparos laŭ la notoj de Amri. Amri enketis la ne-pagantajn israelanojn en la listo: kelkaj ne plu volas, kelkaj volas repagi, kelkaj ne havas validan telefon-numeron.
- c) Pretigo de la kovertoj dum la februara kunsido: enmeti la bbultenon kaj surglui la erikedojn kune (antaŭe laboro farita de la sendanto, ekde 2015 Amri kaj antaŭe Jehoŝua).
- ĉ) Amri estas pli ol 6 jarojn redaktoro. Li pretas resti ankoraŭ unu jaron, dum kiu oni trovu novan redaktoron kun kiu Amri kunlaboru por transdoni de la sperton.
- d) Por logi redaktoron ELI ofertu kompencon. Diskuto. Oni opinias ke reala sumo estu ĉ. 1000 NIS po ekzemplero de IE.

### 6. Jagil

Li petis ricevi la mesaĝojn de ELI-listo. Ni jam decidis renovigi la sendadon sed kondiĉe ke li pagu kotizon kion li ne faris post 2012. Li jam estis aldonita al la ricevantoj kaj Enrica



transdonis al li tiun informon. **Konsento:** Li devas pagi nur ekde 2016. Kun averto: se li ne renovigos, la sendado ĉesos. Ni atendos ankoraŭ unu monaton, kaj retraktos.

## 7. La 17-a Israela Kongreso (Amri)

- a) Reklamado: Amri pretigis modifitan informilon kun skeleta programo kaj prezoj de ekskursoj (post- kaj antaŭ-kongresaj). Li reklamis en UEA-listoj, IE, kaj dum la novjaraj renkontiĝoj. Anonco por la februara Esperanto? Aprobata! Amri klopodos enigi.
- b) Aliĝilo – **Jehoŝua** verku baldau. Ĉu Jael pretos prizorgi la liston?
- c) Ĝis la 10a de februaro oni devas mendi la ĉambrojn, ĉar post la 10.2 Amri devas liberigi la superfluajn ĉambrojn, kiuj estas rezervitaj per lia kreditkarto.
- ĉ) Jam 4 eksterlandaj partoprenantoj: Kajto – du, Renato, Nelly. Pluraj interesiĝas.
- d) **Programo:** Renato – debato, Kajto – kantado, Amri – prelego pri la historio de Israelo, laŭbezone prelego pri vivo ekster-tera. Gila – eble laborgrupo pri propra konscio. Jehoŝua? Programeroj estas bezonataj. Amri atendas roponojn.
- e) Ekskursoj – Amri havas jam programojn por la anraŭ- kaj postkongresaj ekskursoj. Kajto partoprenos page en la PK. Amri parolos kun Jehoŝua por rezervi gastejon en Haifa por la AK.

**La venonta kunsido:** marde, la 9-an de Februaro 2016, je 19:30

**Protokolis:** Gabi Zeevi

## **Anekso: taskoj de la novaj estraranoj**

Amri Wandel - prezidanto, Israela Kongreso, redaktoro de IE, UEA

Jehoshua Tilleman - vicprezidanto, chefdelegito, kotizoj

Shlomo Shahhar - kasisto

Michal Amir - klubestrino, Tapuz

Dror Gaon - retejo

Matilda Landau - Landaj Kunvenoj

Doron Modan - membro

Eldad Salzman - klubestro

Eran Vodevoz - proparolisto, juraj aferoj, KAEM, financa konsilanto

Gabi Zeevi - protokolisto